

## LA VERA KONSCIENCO

Ĉefepiskopo Johannes Dyba el Fulda, Germanio

Ni hodiaŭ vivas en la tempo, en kiu ŝajnas, ke ekzistas rekte inflacio en formado de la konscienco. Preskaŭ ĉiuj sin apelacias al sia konscienco: la konscienco kontraŭ leĝo. La konscienco kontraŭ institucio. La plej alta instanco: mia konscienco. Ĉie oni antaŭeniĝas kun decido de la konscienco, kaj dume ni ĉiam pli diserigiĝas. El ĝojo pro la liberecoj, kiujn alportis al ni pluralismo, ni forgesis pensi pri tio, ke en la nomo de pluralismo ĉiu ideo, ĉiu arbitra opinio, jes ĉiu ekpenaĵo de la idioteco okupas la saman nivelon kiel malnovaj pruvitaj veroj, kaj la komuneco disfaliĝas. Tion ni hodiaŭ ĉiuj sentas kaj tio estas ankaŭ kaŭzo de nia krizo, de nia ĉiam pli forta senkonsileco. Disfaliĝis komuna fundamento de la etika konvinko, ĉar ĉiu proklamas propran decidon kaj la konsciencon kaj ofte nuran propran inklinon kiel netuŝeblan la plej altan instancon.

Ni forgesas, ke ekzistas ankaŭ trompema kaj falsa formado de la konscienco, kiu en la historio kaŭzis multegan malfeliĉon. En la nomo de la konscienco ekzekutis jakobenoj per gilotino multnombrajn kvantojn de la homoj, cent kvindek jarojn pli poste oni propagandis „purecon de raso kaj sango“. Unue estis formigita konscienco, por ke ĝi kapablu kun senkompata dureco volonte ekstermi „malplivalorajn homojn“.

Kiel tre ni povas per nia konscienco erarvagi! Ĝis kien povas la konscienco iri! Hodiaŭ ni vidas, kiel estas centmiloj da infanoj murdataj en patrinaj sinoj, kaj ankaŭ tion oni justigas per decido de la konscienco.

Surloke do estas la krita demando: Laŭ kio devas nia konscienco orientiĝi? Ĉu laŭ

la vero? Ĉu laŭ la Dekalogo? Aŭ ĉu estas la propraj deziroj mezuro de ĉiuj aferoj?

En nia socio hodiaŭ moviĝas danĝeraj „aŭtonomoj“. Per tio mi esprimas „aŭtonomian konsciencon“. Sed la homa konscienco ne estas aŭtonomia, sed

senzitiva kaj perceptema organo. Siamaniere ĝi estas radara aparato de nia animo, akceptanta Diajn impulsojn kaj ondojn. La sanece funkcia konscienco akceptas tiujn Diajn impulsojn kaj la Diaj ondoj nin kondukas al Dia volo, al ĝia plenumo, tiel kiel ni preĝas en la preĝo Patronia: „Fariĝu via volo!“

Per tio ni do aliras al tre ĝoja temo pri la vera kaj bona konscienco. Ĉar se la afero funkcias tiel, ke ni akceptas Dian volon kaj laŭ ĝi ni orientiĝas en tio, kion Dio de ni volas, poste ni ne plu povas stari kontraŭ ni kaj eĉ ne ekster ni, sed poste ni akceptas de Dio tion, kio nin kunvenigas, en komunecan de la kristana konvinko, kiun ni tiel hodiaŭ serĉas kaj kies perdo en nia socio tiel fatale evidentiĝas. Sed se ni akceptas, al kio nin Dia Spirito kondukas, do al la vero kaj bono, poste ni povas esti kune feliĉaj kiel infanoj de Dio. ■ *Laŭ Dienst am Glauben 4/2009*



Ĉefepiskopo Johannes Dyba  
\*15.8.1929 - †23.7.2000